Bimestriel culturel d'information & d'expression espérantiste
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 2,50 FF
Nº 22 (40) Oktobro 1979.

ISSN 0150-5823




Eldonas: Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux

Abono por unu jaro : 15 FF (12 FF por Francio) al la ĉi-apuda pĉk.

F U T U R O L O G I O - F U T U R O L O G I O - F U T U R O L O G I O - F U T U R O L O G I O - F U T U R O L O G I O -

Nia unua debato per cirkulanta leteraro :

# ĈU kaj KIU Estonteco por Esperanto ?

La enkonduko :

Roberto : Kio estas esperanto ? Tutcerte lingvo "artefarita" aŭ, kiel kelkaj preferas diri : "planlingvo". Estas tamen banalaĵo diri, ke ekzistis

aŭ plu ekzistas multaj aliaj lingvoprojektoj, kiuj senescepte fiaskis, eĉ plejofte ne sukcesis vivi. La (relativa) sukceso de esperanto kuŝas ne nur en ĝia strukturo, sed precipe en la movado, kiu vivigas ĝin.

La movado dividiĝas ĉefe en du tendarojn, nome la "neŭtrala" UEA kaj ĝiaj landaj sekcioj (en Francio UFE) por kiu esperanto estas celo per si mem, t.e. solvo de la lingva problemo, kaj la "laborista" movado, t.e. SAT, por kiu esperanto estas neniel celo sed rimedo por utili al la klasbatalo. Apenaŭ necesas mencii kelkajn "skismulajn" grupojn NEM (Neŭtrala Esperanto-Movado) kaj la komunista FET (Fédération Espérantiste du Travail). Ĉu oni povus imagi esperanton sen movado ? Mi kredas, ke ne. Almenaŭ en la nunaj cirkonstancoj. La organizado de la instruado de E estas tute ligita en nia lando kun E-asocioj, ankaŭ la eldonado de E-libroj. Sen E-grupo oni malofte havus eblecon praktiki la lingvon. Ankaŭ por E la estonteco estas produkto de la nuntempo.

Kiel oni esperantistiĝas ? Multaj eklernintoj ne lernas ĝisfine, multaj ellernintoj ne aliĝas al la movado ; ĉu ili plu interesiĝas pri esperanto, estas malfacile scii.

Al mi ŝajnas, ke necesas motivo por lerni la lingvon kaj plue praktiki ĝin ; nura interŝanĝo de poŝtmarkoj ne sufiĉas por tio. Ĉu tiuj motivoj estas pure lingvaj aŭ precipe politikaj ?

La unua kontribuo, de nia neelĉerpebla

Ĵakvino : Esperanto estas lingvo pli logika ol nacia lingvo, jes certe, sed, se oni komparas Esperanton kun aliaj artefaritaj lingvoj, ĉu vere la komparo estas favora por Esperanto ? Tiun komparon ne povas fari mi mem, ĉar mi scipovas neniun alian artefaritan lingvon, sed mi pretas kredi, ke Ido estas pli logika ol Esperanto. Kial do, inter ĉiuj projektoj por internacia lingvo, sukcesis nur Esperanto ?



Zamenhof intencis krei du aferojn interligitajn: iun lingvon, Esperanton, kaj iun religion, homaranismon. Nur la lingvo sukcesis vivi, sed, laŭ mia kompreno, vivecon ĝi elsuĉis el sia ĝemelo. Esperanto eskapis la mortnaskiĝon, nur alprenante en sin la religian spiriton de Zamenhof. Kiaj estis la unuaj tekstoj de la E-literaturo ("La espero", "Preĝo sub la verda standardo", ktp)? tute idealistaj, utopiaj tekstoj. Kaj la lingvo tuj alprenis nomon, kiu ne aludas pri lingvo, sed alvokas idealismajn sentojn : Esperanto.

La interna ideo de E, tiu emo al homa frateco, universala paco, reakordiĝo, ktp, ktp, estas necesa, por ke ekzistu lingvo. Lingvo ne povas esti nura komunikilo, ĝi kapablas vivi nur, se ĝi estas ligita per aferoj plej ofte ne konsciaj. Nacia lingvo nutras sin el la historio, la kutimoj, la kredoj, ktp, de la koncerna nacio. Kelkfoje lingvo estas ligita al neniu reala teritorio, sed estas konservata de nacio vivtenanta sin nur per fideleco al sia propra mitologio, tio estas la kazo de la hebrea lingvo, ligita inter 70 kaj 1947 al neniu lando, kaj poste rekreita pro religia tradicio. Same kiel ĉiu ajn vivanta lingvo, Esperanto estas nutrata de sia mitologio, kaj ne povus vivi sen ĝi. Nuntempe, la poemoj de Zamenhof tute tedas junajn esperantistojn, kaj la stilo de niaj avoj el Sisteron ridigas nin.* Sed ĉu tiu spirito, el kio fontas Esperanto, estas mortinta ? Tute ne ! Kion kantas niaj junaj longharuloj ? "En mia kor', firme kredas mi, ke iam ni venkos en glor'" (Joan Baez). Ĉu tio ne sonoras kiel poemo de Zamenhof ? Aŭ : "Kiam ĉiuj malsatuloj kaj ĉiuj subprematoj aŭdos la alvokon, la krion 'Libero!', ĉiuj disrompitaj katenoj forfalos por eterneco" (Graeme Allwright). Ĉu tio ne aspektas kiel malnova ilustraĵo de SAT-teksto?

---

* "L'espérantiste sisteronnais" estas ĝuigega E-gazeto en franca lingvo, kiu aperis antaŭ la dua mondmilito kaj estas nun trovebla en la muelejo de Bovil' (senpaga reklamo, kompreneble).

Por ke tiuj junaj idealistoj interesiĝu al E, necesas nur ke ĝi ne plu estu prezentata per malnovstilaj gazetoj fare de simpatiaj 80-jaruloj. Sed se oni kantus la poemojn de Zamenhof bluse...

Interveno de Suzana : - Ja, E estas nutrata de sia idealo ; sed mi tute ne ŝatas, ke oni nomas ĝin "mitologio" aŭ "religia spirito de Zamenhof". Nia idealo ne estas religieca. Kvankam fervore mi amas ĝin kaj aspiras al ĝia realigo. Eble neniam ĝi realiĝos, tamen ĝi estus realigebla en favora okazo. Ja, tute ne oni antaŭvidas ĝin, ĉar la plimulto el niaj samtempuloj fariĝas pli kaj pli sugestiataj robotoj, fare de la estroj de la hombrutaro, kiuj direktas ĝin al tute kontraŭa celo. Do, mi estas pesimismema...Sed, en la pasinteco, la kaŭzoj de gravaj eventoj (Franca Revolucio, Napoleona periodo, nazismo) kuŝas en propra fakto, kiu trafis nur la individuon : Ludoviko la 16a, Napoleono, Hitlero... Iam, eble pli proksime ol ni supozas, similaj kaŭzoj okazus... Kaj la robotoj vekiĝos...aŭ vekiĝus. Pri la mito, neniel oni realigus ĝin.

Pluas Ĵakvino :

Estonteco de izolitaj E-parolantoj : Ja kelkaj personoj kutimas paroli sole, tamen, kutime, lingvo necesigas kolektivon de almenaŭ 2 personoj por ekzisti. Kiel povas interrilati tiuj personoj, se ne estas movado ? Kiu instruos al ili la lingvon ? Kun kiuj ili parolos ĝin ? Tion mi ne imagas.

E povus ekzisti sen movado, se io alia zorgus pri tiu tasko de instruado kaj kontaktigo. La ŝtato povus ludi tiun rolon, se E estus deviga studfako. Sed nun en Francio la ŝtato tute ne zorgas pri E. Kaj se tio eblus, mi tro timus, ke la ŝtato, ekregante nian lingvon, tute ŝanĝus ĝian spiriton kaj etoson. Mi estas unu el la studentoj de la universitato de Clermont-Ferrand, kiuj plu estas esperantistoj. Se oni ne enkondukus E-on en tiun universitaton, estus do almenaŭ unu esperantistino malpli en Francio. Jes ja! kaj valora, ĉu ne ? Tamen mi avertas la kampanjantojn por enkonduko de E en la lernejojn, ke ili ne havu tro da iluzioj : la morgaŭon post la diplomo, estos malpli da esperantistoj. Mi preferas, ke E-on oni lernu pro entuziasmo, ol devigite de la studprogramo (fakte mi same havus miajn universitatajn diplomojn ankaŭ sen E, tion mi sciis, kiam mi enskribiĝis por la kurso de Janton kaj verŝajne nur tial mi plu estas esperantistino post la kurso).




Gravan rolon povas ludi E-gazetoj ligitaj al neniu movado, se ili ebligas veran dialogon inter la legantaro. Izolito povas ŝati legi E-on, kaj kuraĝi ĝin skribi por tia gazeto. Sed la legantaro de E-gazeto devas esti lerninta E-on ie, t.e. en la movado.

Estonteco de UEA

Mi ne kompetentas por prijuĝi la estontecon de UEA, ĉar mi tro malbone konas tiun medion. Ĉar tio povas interesi UEA-legantojn de Laŭte, jen mia sperto pri UFE. ../...

La desegno neniel rilatas kun la debato ! Red.



Mi ĉeestis nur dufoje en kunvenoj de la grupo de Strasburgo. Ĝi konsistas el unu viro ĉirkaŭata de haremo da 5 aŭ 6 virinoj. Ĉar la meza aĝo estas almenaŭ 65 jaroj, ĉiuj estas denaskaj germanlingvanoj. Dum la unua kunveno, en kiu mi partoprenis, oni festis la Zamenhof-tagon per trinkado de alkoholaĵoj, manĝado de kuketoj kaj krokodilado en alzaca dialekto. Por la dua kunveno, verŝajne volante montri, kiel E venkas la ŝtatlimojn, oni invitis sufiĉe junan esperantiston el Kehl, urbeto situanta 3 km-ojn de mia domo, sed en Germanio, por ke li montru al la ĉeestantaro lumbildojn pri orkideoj. Tiu germana samideano klarigis en Esp-o, ke li ne estas tre bona e-isto, tial la prelegon pri orkideoj li faris en germana lingvo. Post la prelego kaj montrado de la lumbildoj, unu el la maljunulinoj demandis min : "Ĉu vi komprenas la germanan ?" Fakte mi sufiĉe bone komprenas la germanan, sed mi ne bezonas la UFE-grupon de Strasburgo por ĝin praktiki, tial mi ne revenis, kaj mi ne pretas veti multon pri la estonteco de UFE en Strasburgo.

Poste mi tamen ekscis kun granda ĝojo, ke ekzistas ankaŭ pli junaj kaj aktivaj UEA-membroj en Alzaco, interalie instruistoj, kiuj enkondukis E-on en siajn liceojn. Tial mi tre miris, kiam ĉe la kongreso de la orienta federacio de UFE en Kolmaro oni asertis, ke la grupo de Strasburgo estas la plej vigla de la tuta regiono.

En Loreno, ĝisosta sennaciisto, SAT-Amikaranoj kaj UEA-anoj faras kune, en la kadro de UFE, tre interesan laboron poresperantan, interalie staĝon de parolata E en Nancio.

Plian sperton pri UEA mi ne havas. Tamen, laŭ tio, kion mi povis aŭdi kaj legi pri ĝi, TEJO devas esti tre interesa medio, kaj tial mi supozas, ke UEA ja havas estontecon. Sed mi ne komprenas, kiel oni konceptas la principon pri neŭtraleco de UEA en la kadro de TEJO. Mi tre ŝatus ke, responde al mia klaĉado, iu UEA-ano partoprenu en nia debato, aŭ skribu al Laŭte pri UEA, por ke ni konu la vidpunkton de iu el tiu medio.



## Estonteco de SAT

En SAT kiel en UEA ekzistas e-istoj, kiuj tre emas al la kulto de la sankta fondinto kaj alkroĉiĝas al la grandaj idealoj pri fina venko de E en la mondo. La nura diferenco inter la revemuloj de UEA kaj la revemuloj de SAT estas, ke t. n. sennaciistoj kultas al Lanti anstataŭ al Zamenhof, kaj imagas la venkon de E en la mondo nur per la morto de ĉiuj aliaj homaj lingvoj kaj de ties kulturoj. La ekzisto de imperiismo ligita al E ne estas mirinda, ĉar multaj aliaj lingvoj kreis siajn imperiismojn. Ekzemple, germanon, kiu deziras la venkon de la germana lingvo per la morto de ĉiuj aliaj lingvoj kaj kulturoj oni nomas nazio.

Suzana : Neniam mi aŭdis, ke E postulas la morton de ĉiuj lingvoj kaj de ties kulturoj ; eĉ, mi aŭdis la malon ! Slogano diras proksimume "ĉiu homo scipovu sian nacian lingvon, kaj esperanton".

Ĵakvino : Tamen, la kulturo de la lingvo E ne havas en sia mitologio laŭdadon de militherooj, memoradon pri grandaj bataloj, ktp, kiel havas aliaj lingvoj, tial ĝia imperiismo manifestiĝas nur perparole. Ĉar e-istoj estas en la mondo nur senpova minoritato, sennaciistoj minacas nenion, krom la estonteco de SAT. Ili kutimas kredi kaj kredigi en la tuta Esperantujo la tute eraran aserton, ke SAT estas Sennaciista Asocio Tutmonda. UEA-anoj plej ofte ripetas tiun tute eraran aserton, tiel ke junaj e-istoj estas firme konvinkitaj, ke aliĝi al SAT estas aliĝi al sennaciismo. Ĉar ĉiu malstultulo komprenas, ke la celo de sennaciistoj ne estas realigebla, kaj ĉar ĉiu informito scias, ke etnismaj movadoj preskaŭ ĉiam estas maldekstraj, la rezulto estas, ke junaj maldekstraj e-istoj ne volas aliĝi al SAT por ne fariĝi sennaciistoj. La konsekvenco estas, ke SAT konsistas ĉefe el membroj aĝantaj pli ol 65 jarojn, kiuj bone konscias, ke ili estas sur la vojo al tombejo, kaj dum ĉiuj kongresoj angore

demandas sin, kiuj venos post ili por certigi la estontecon de SAT.

Tial necesas diri kaj rediri, ĝis konos ĝin ĉiuj e-istoj, tiun veraĵon, kiu troviĝas en la verkoj de Lanti : SAT ne estas sennaciista asocio.

Suzana : Mi ne estas kompetenta por paroli pri la junaj maldekstraj e-istoj... Mi diras nur : SAT helpas al la ruinigo de la landlimoj per sia sennacieca spirito. Tio estas grava fakto.

Ĵakvino : Kio estas SAT ? Laŭstatute, SAT celas utiligi praktike E-on por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda. Eble iam tio estis fakto, sed nun tio estas nura teorio. Ekde mia aliĝo al SAT mi malofte havis la okazon aŭdi ion seriozan pri klasbatalo. Ĉe la 52a kongreso de SAT mi tre ĝojis, ke unuafoje oni rezignis kanti la "Internacion", ĉar aŭdante la vortojn "Leviĝu, malsata sklavar' de la ter'" tuj post la kvalite kaj kvante bonega vespermanĝo de Swanwick, mi povus nur plusidi. Kanti tion en SAT oni povas nur per kvazaŭ religia fideleco al tradiciaj ritoj sen ia ajn rilato kun la realo. Ja ekzistas la malsata sklavaro de la tero, la triamondanoj, la kvaramondanoj, la gastlaboristoj, ktp, sed tiuj tro dronas en mizero por interesiĝi pri kultura E-asocio. Ni ne insultu ilin per niaj kantoj !

Suzana : En nia epoko oni ne devas laŭlitere kompreni "Leviĝu malsata sklavar'..." Kvankam la partoprenantoj en kongreso plejparte estas homoj, kiuj havas sufiĉe altajn vivrimedojn, kies profesioj estas inter la plej agrablaj kompare kun ministoj, ekzemple, ili estas sklavoj de la konsumsocio; celante akiri ĝiajn produktojn, iuj daŭrigas la laborhorojn. Do, ili estas sklavoj de la deviga laboro, sekve, de la kapitalismo.

Ĵakvino : Malveras la klaĉo, ke SAT ne estas laborista asocio. SAT-anoj plej ofte estas laboristoj, aktivaj aŭ emeritaj, sed ilia laboro estas ĝenerale intelekta kaj plej ofte instruada aŭ kultura. Tial, la klasbatalaj ideoj, kiuj eble ekzistis ĉe la fondado de SAT(tiam mi ne estis naskita), estas anstataŭataj de la grandaj idealoj de la tuta homaro, sed vestataj en SAT per maldekstra terminaro : Paco, Libero, ktp. Antaŭ nelonge oni aldonis pli laŭmodajn idealojn : Mediprotektadon kaj Homrajtojn.



Praktika utiligado de E por tiuj celoj estus, ekzemple, ke la internacia sekretario de Amnestio Internacia sendu al la strasburgaj adoptgrupoj la dosierojn pri novaj malliberuloj ne plu en angla lingvo, sed en E. Tio estus racia, demokrata, ktp, ktp. Jes, sed en la realo estas en Strasburgo 5 aŭ 6 grupoj de AI, havantaj po dudeko da aktivaj membroj, kaj entute unu esperantistinon. Male, estas en ĉiu grupo almenaŭ unu persono kapabla legi kaj skribi la anglan. Jen la situacio :

- se estus pli da e-istoj, povus realiĝi la postulo pri praktika utiligo de E.
- se la praktika utileco de E estus pli okulfrapa, pli da homoj ĝin eklernus.

Kiel eliri el tiu infera cirklo ? Mi ne scias.
Ĉu SAT havas estontecon ? Necesus por tio, ke oni klare sciu, kion SAT-anoj intencas fari kune. Nun:

- kelkaj SAT-anoj kredas, ke SAT havas kiel celon sennaciismon. Tiu kredo estas erara.
- kelkaj e-istoj aliĝas al SAT por utiligi praktike E-on por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, kaj rapide konstatas, ke tion oni ne faras ĉe SAT (nek cetere aliloke).
- plimulto de SAT-anoj konformiĝas al alia punkto de la statuto, laŭ kiu SAT estas kultura asocio, kie okazas diskutado pri faktoj kaj ideoj kun respekto al ĉiuj konvinkoj kaj skoloj de la laborista medio. Tial okazas ĉe SAT, unuflanke debatoj pri politikaj kaj aktualaj problemoj, ĉu dum kongresoj, ĉu per la gazetoj de SAT, aliflanke eldonado de literaturo pri tiuj temoj (interalie fare de la broŝurservo).

Ĉu tio utilas ? Nu, se per "utileco" oni komprenas tuj konkrete videblan rezulton, ne. Sed komparo de siaj ideoj kun aliesaj utilas al la evoluado de la individuo. Ekde mia aliĝo al SAT,

mi povis ekkoni interesajn verkojn de politikaj teoriuloj, kaj mi povis diskuti kun aliaj e-istoj pri temoj, kiuj min interesas. Sed pli oni ne devas postuli.
SAT eble havas estontecon kiel tutmonda forumo por debatado pri socikritikaj ideoj. Tia forumo, laŭ mia scio, ne ekzistas aliloke. Sed se tio SAT intencas esti, tion oni devas klare diri.

Suzana : Mi tion aprobas. Same kiel la uzado de E ĉe "Amnestio Internacia" kaj ekologio, ktp. Ja,vi ĉiuj scias, ke nia lingvo estas agnoskita ĉe la Poŝto. En Germanio mi ricevis telegramon esperantlingvan. Mi ĵus ricevis poŝtkarton pri Cannes. Oni uzis 10 lingvojn por tiu ĉi frazo : "La poŝtkarto de la Amikeco". E estis la 10a lingvo. Agrable, mi miris !

Ĵakvino : Estonteco de peresperantaj fakasocioj

Ekzistas en rilato kun UEA asocioj, kiuj metas E-on al la servo de plej diversaj celoj, ĉu distraj (ekzemple ŝako aŭ filatelio), ĉu religiaj (ekzemple kvakerismo), ĉu profesiaj (ekzemple fervojistoj aŭ poŝtistoj), ĉu aliaj. Ekzistas en la kadro de SAT frakcioj, kiuj celas meti E-on al la servo de politikaj medioj (ĉefe la anarkista kaj la pacista). Kaj ekzistas ekster ambaŭ asocioj fakasocioj, kiel la Ekologia Rondo Esperantista.
Mi opinias, ke tiuj asocioj estas plej gravaj,ĉar:
- nur ili povas realigi la postulon, ke E havu praktikan utilecon. SAT debatadas kun egala respekto al ĉiuj konvinkoj, sed la pacista frakcio povas informi pri enkarcerigitaj armerifuzantoj, sendi monon por Larzako, ktp.
- ili estas tre utilaj por la propagando. Kiam mi ĉeestas en Bazelo en internacia kunveno de ekologiistoj, pli utilas montri "Ekoperanto"n kaj la broŝuron en E pri Fessenheim kaj Wyhl, ol paroli pri la beleco, la simpleco, la neŭtraleco, ktp, de la zamenhofa lingvo.

Estonteco de tiuj asocioj dependas de la momentaj interesoj de la homaro. Nun ĉiuj homoj povas aŭdi pri ekologio, eble morgaŭ ĵurnalistoj plenigos la



gazetojn per aliaj temoj. Sed mi opinias, ke ĉiam devos resti en Esperantio tiuj fakasocioj, kaj ke ilian gravan rolon oni devas malneglekti. Tamen ili fariĝus gettoj, se ili ne ligus sin al la E-movado ĝenerale.

Suzana : Mi tute aprobas la ĉi-suprajn opiniojn. Ja, kiel Ĵakvino, mi opinias, ke ĉiam devos resti en E-io tiuj fakasocioj, sed mi ne samopinias pri alligo al la E-movado ĝenerale.
Eble, tiuj frakcioj fariĝus "gettoj" laŭ Ĵakvino, sed en la E-movado ili restos minoritato, kerno, kiun la plimulto ignoros. Antaŭ 21 jaroj, en UEA-kongreso en Mainz, okazis pacista kunveno. Edmond Privat zorgis pri ĝi (kvankam li estis duonparalizita). Kiel ĉiam, la ĉeestantoj estis malmultaj. Eĉ ekster la E-medio, ni ĉiuj scias tion! Mi aŭdis francan e-istinon, dirantan :"Lia ŝatokupo !Tio malhelpas la disvastigon de E-o!" Mi kredas, ke en UEA multaj anoj tion opinias! En Nederlando mi ĉeestis packunvenon. Ĉeestis nur kerneto. Do, en E-movado tiaj frakcioj estos kvazaŭ gettoj, kaj plie, malpli liberaj por agi. Tre ofte, samtempe, okazis ĉefa prelego de lerta, fama e-isto, kiun prelegon multaj "ŝafoj" ĉeestis. Ja, estas agrable aŭskulti iun flue parolantan, tamen, kiam temas pri Paco, tio estas multe pli utila por la Homaro !

(daŭrigota)

La dua parto de tiu debato aperos en venonta n°.

*********************************************

Ĉe la broŝurservo : Denove estas disponeblaj du ĝis nun elĉerpitaj broŝuroj :

* ...El la kara infaneco (Valo), 100 p. .KI. 8 FF
* Initiation à l'Esperanto (An Kaù), 46 p. .IE. 3 FF

Dankon pro via atento! Kribo

*********************************************

"Laŭte!" ne povas elsaviĝi el pli kaj pli rapide "galopanta" inflacio.
Nova jar-abono: 15FF (12FF por Francio)

Ĉi-somere, ne tradicia kaj spektakloplena amasiĝo da homoj, sed multe pli diskretaj agadoj laŭ la kutima instruplena larzaka rezistado : per laboro, civila malobeo, per memstara organizado de la subtenantoj al la kamparanoj.
Kio okazis ?

**************************

LARZAKO

Someraj agadoj

**************************

* Multaj individuoj el diversaj regionoj, eĉ nefrancaj, libervole laboris en iu el la diversaj konstruejoj dum pli malpli longa tempo. Eblis riparo de domoj, de vojetoj, de ŝtonaj muroj, - signado de vojetoj, konstruado en l'Hospitalet de kultura centro sur tereno elektita de la armeo por fari militistan fervojon - instalado de telefonaj linioj...

* Pluraj Larzak-komitatoj el diversaj departementoj partoprenis siavice al informa laboro ĉe turistoj, scivolemaj personoj, kiuj eniris informejojn (en tri diversaj lokoj : La Couvertoirade, La Grande Jasse, kaj Cresseils).

* Estis staĝoj pri pluraj temoj, kiujn respondecis "Le Cun du Larzac". Ekzemple : "Kial kaj kiel fariĝi militobĵetanto?" "Praktika instruado por aktivula agado" "Inicado al civila malobeo", ktp...

* Vesperaj kunvenoj (individuaj aŭ grupaj iniciatoj).

Mi vidis projekciojn pri la diversaj aspektoj de Larzako, kiujn prezentis naturamikoj kaj pri agadoj kontraŭ konstruado de uzino por trakti nukleajn rubojn en Germanio (prezentita de Germanoj en germana lingvo...estis tradukproblemoj, bedaŭrinde ne eblis bone diskuti... Esperanto havas ŝancon en la larzaka medio, ni devus pripensi pri ebla agado...)

* Festo okaze de la rikoltoj sur militistaj terenoj kulturitaj.

Por pli detalaj kaj kompletaj informoj, vi povas legi la gazeton "Gardarem lo Larzac" (por aboni, skribi al G.L.L. Potensac 12100 MILLAU) aŭ kontakti lokan Larzak-komitaton (kies centra organizo troviĝas en Millau rue Glossop - Coopérative agricole) aŭ rilati kun "Le Cun" (Route de St Martin du Larzac, à Pierrefiche, 12100 MILLAU)

Nicole.





## LA MISTERO DE ATEISTA PROPAGANDO (III) (vd. Laŭte 20 kaj 21).

### II. Kelkaj tute personaj konsideroj pri Dio

Mi tute ne povas respondi la demandon : "Kial vi kredas, ke Dio ekzistas ?", ĉar mi ne kredas, ke Dio ekzistas : tion mi scias. Se mi kredus, ke Dio ekzistas, probable ateistoj estus sukcesintaj de longa tempo perdigi al mi la kredon. Sed mi scias, ke Dio ekzistas, tial mia kazo estas tute malesperiga.

Ateistoj argumentas, ke oni ne povas kredi al Dio, ĉar li neniam manifestiĝas. Tio multege surprizas la kristanojn, kiuj kutimas konstati la sinmanifestadon de Dio ĉirkaŭ si. Por kompreni tion, oni devas unue kompreni tiun gravan fakton : ateistoj kaj kristanoj ne havas la saman Dion. Tiu, kiu ne ekzistas, estas tiu de la ateistoj. Por ateisto, Dio = Superpovo, tial ateisto atendas, ke Dio faru supermiraklon por lin konverti. Kaj tial ateisto pensas, ke dikredo nepre pravigas obeon al ĉiu surtera potenco. Nu, por la Nova Testamento, Dio = Amo, kaj ĉe kristanoj tio pravigas plej diversajn aferojn, de donaceto al monaĥinoj por aĉeti karbon al malriĉaj maljunuloj, ĝis senkapiĝo per hakilo pro rifuzo militservi ĉe la nazioj. La sinmanifestado de amo en la mondo estas okulfrapa, sed raciistoj principe kredas, ke Dio povas sin manifesti nur neracie. Tion ne kredas kristanoj.

Iam malstulta ateista SAT-ano rebatis al tio:" Mi ne komprenas, kial oni ne nomu la amon simple amo, anstataŭ uzi la vorton Dio". Racie mi povas respondi, ke mi konscias pri mia aparteno al iu tradicio, kaj uzas la terminaron, kiun ĝi heredigis al mi, por esprimi aferojn, kiuj estas pensataj en aliaj kulturoj, kie oni esprimas ilin per aliaj vortoj. La homa menso ne estas universala. Sed la vero estas, ke kristaneco ne estas filozofio pri la origino de la universo aŭ pri la bazoj de homa etiko, sed konsistas el intima rilato de persono kun Jesuo. Kristano, kiu volas pravigi sian kristanecon per raciaj argumentoj povas esti tute sincera, sed li ne diras la veron, ĉar traduko estas perfido. Se Leonardo

de Vinci provus klarigi per raciaj argumentoj, ke Mona Lisa estas bela, lia parolado estus malpli vera ol la pentraĵo. Mi pensas "Pacon al vi" kaj diras "Bonan tagon", mi pensas "la homaro saviĝos el la morto per amo" kaj skribas "Se la homaro volas eskapi baldaŭan katastrofon, kiu eble metos finon al ĝia ekzisto, nepre devas grandiĝi la translima solidareco". Mi samtempe sinceras kaj perfidas mian penson. Kiam mi uzas vorton kiel "Dio" aŭ "preĝo", mi scias, ke oni komprenas ion alian ol la realon, kiun mi volas esprimi, se eĉ oni ne komprenos ĝian malon. Sed kiel fari alie ?

Archdeacon havas naivegan koncepton pri preĝo. Ne, mi ne parolas al iu superpotenca estanto, por provi konvinki ĝin, ke ĝi faru mian personan volon. Mi povas silenti kaj konsciiĝi pri la ĉeesto de amo en mi mem kaj en la ĉirkaŭa universo. Sed kiel klarigi mistikan sperton alie ol per mistikaj vortoj?

Eble mi eraras, sed mi havas la impreson, ke la terminaro de raciistoj pli taŭgas por komputeroj ol por la esprimado de homaj sentimentoj. La plej raciista el miaj fratoj diris al mi : "Mi havas vivprincipon : mi kredas nur tion, kio estas racie pruvita". Mi rebatis : "Pruvu racie, ke Sofia estas cia filino". Reago : "Nu, kompreneble, pri sentimentoj..." Mi miregis, ke oni povas difini sian sintenon en la vivo per principo, kiu ne aplikeblas al sentimentoj, kvazaŭ ili estus hontinda aŭ neglektinda flanko de la homa vivo. Mi havas la impreson ke, se mi asertus al raciisto : "Mi sentas amikecon al ci", li postulus : "Pruvu tion racie", antaŭ ol min kredi.

Mi uzas la vortojn, kiuj plej taŭgas por esprimi min mem.


Li legis kun granda intereso la unuan volumon de la "Etiko" de Kropotkin, kaj havis la impreson, ke tio, kion li nomas la reciproka helpo similas tion, kion Jesuo nomis Dio. Vidante, ke estas ĉapitro pri kristanismo, mi atendis viglan polemikon, kaj konstatis laŭdon de Jesuo. Pri la riproĉo, ke liaj disĉiploj devojigis lian instruon, mi konsentas, sed pri tio pli kaj pli konsciiĝas kristanoj (tial, kaj ne nur pro progreso de materiismo, malpleniĝas la preĝejoj). Estas iom mirige por kristanino retrovi sin inkluzivita en verko pri ateista moralo, sed estas fakto, ke kristanoj kaj ateistoj kondutas ekzakte same, ĉu heroe, ĉu krime. Sur la geometria tereno, ĉu oni akceptas la postulaton de Eŭklido, ĉu oni rifuzas ĝin, oni alvenas proksimume al samaj praktikaj konkludoj. Povas esti, ke, sur la tereno de homaj interrilatoj, akcepto aŭ rifuzo de la postulato pri Dio naskas du malsamajn mensajn universojn, sed samajn praktikajn kondutojn.



Ĝojinde por mi, la anarkiistoj de SAT havas pri SAT-kristanoj la saman toleron, kiel Kropotkin. Mi skribis al la tiama sekretario, ke miaj religiaj konvinkoj instigas min aliĝi al la liberecana frakcio de SAT, kvankam mi ankoraŭ ne bone scias, kio estas anarkiismo. Li respondis al mi, ke ne estas unu anarkiismo, sed diversaj formoj de liberecana penso, inter kiuj la kristana. Ĉar mia letero aperis en "Liberecana Ligilo", ĉiuj miaj anarkiistaj gekamaradoj konas la konvinkojn de k-ino Lépeix, kaj mi plu estas en la frakcio. Ridetigas min tiu asocio, kies plimulto estas konvinkita, ke kristaneco nepre ligiĝas kun militismo, klerikismo, reakciismo, kaj tuta aro da abomenindaĵoj, kaj kie oni insistas ĉe kamaradino kristana, por ke ŝi plu estu sekretariino de la pacista frakcio, kaj prezidu kongreson de SAT. Kvankam eksterekleziа kaj kontraŭklerika, mi ja estas kristanino ; kaj ĉio, kion mi skribas, ligiĝas pli aŭ malpli rekte al tiu kristaneco mia. Ĉar mi fakte skribis multon, mi miras, ke miaj gekamaradoj ankoraŭ ne ekkonsciis pri la fundamenta aĉeco, kiu nepre ligiĝas al mia stato. Sed por tion kompreni mi probable ne estas sufiĉe racia...

Jacqueline.

************************************************************




Provdesegno de mistera artisto

Niaj bonaj paĝoj :
****************

Albert GOODHEIR
"Merlo sur Menhiro" *

MORTO DE KVERKO

Centjara kverko,
ombro por bovaro,
nun kuŝas sur tero.
Forhakitas branĉoj ;
jarringojn multajn
la segilo nudigis.
Majverdo, folifalo
nun morta ligno.
Ne plu loko por kverkoj.
Oni konstruas domojn,
ĉar la mondo progresas,
samaspektajn skatolojn
kun garaĝo, ĝardeno,
hundo kaj du infanoj,
civitanproduktado
por mondo konvencia,
homoj obeemaj
kiuj aĉetas ĉion.
"Forbuldozu radikojn,
venenu trudherbojn ;
oni alkutimiĝos ;
homoj formikiĝos."
Jam mortis papilioj.
Vi diras : "Akceptu,
ni devas progresi."
Mi demandas : kien ?

MORTINTA VILAĜO

Benzinodoro
en la malnova stalo.
Glatigis tiun trabon
la dorsoj de la bovoj ;
ĉiu havis nomon.

Ne vokas infanoj ;
vakas la lernejo.
Lumas fenestroj
nur dum ferio.
Kreskas herbo sur padoj,
en kampo, ĝardeno,
rumeksoj, urtikoj.

Sub krizoj kaj strikoj
ŝvitu en koŝmaroj
la novaj posedantoj,
londonaj bankieraĉoj !

BELFAST

En Belfast sur pavimo
en flako de sango
kuŝas knabino.
Eble ŝi travivos
sen kruroj.
Sur muroj vokas sloganoj :
"Libero"
"Al infero la Papon"
"Dio estas amo"

Tra la tuta mondo
oni faras
flakojn de sango,
sloganojn.
... ... ... ... ...
... morgaŭ kuŝos aliaj en sango.
Pasas aŭtoj,
eble iu kun bombo.
"Mortigu la murdistojn"
sloganas tiu muro.

* Eldonis Glasgova
Esperanto-Societo
– 1974
(komunikita de O.Badet)



Nia felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO...
*************

Neniu stelo, neniu lumo, nur akvo, koto, inkonigra nokto, feliĉe relative varmeta. Kun mia kamarado Paŭlo ni interkonsiliĝis. Plian fojon, malgraŭ la marmalsanaj sekvoj, ni decidis, ke mi ekiros esplore, lasante Paŭlon kun la du neuzeblaj bicikloj.

Jen sub la pluvego mi ekiras, gvidate nur de la kavoj kaj fosaĵoj de la pado. Paŭlo konservis la elektran lampon por eventuale gvidosigni sin. Post proksimume unu horo da marŝado, mi fine ekvidas briletantan lumon. Baldaŭ haltigas min la hurlado de tri aŭ kvar hundoj, kiuj, feliĉe ŝnuritaj, tamen sukcesis alarmi. Signallampo truas la malhelon kaj mallonge lumigas blankajn murojn. Provante superi la bojadon de l'hundoj kaj la bruon de la ŝtormo, mi ekkriegas. Tiel neatendita alveno en tia horo kaj en tia sezono nepre devis alarmi la plej kuraĝan. Tiu ĉi revenis al la domo kaj eliris denove kelkajn minutojn poste, akompane de 3 aŭ 4 fortikuloj kun lampoj. Tiel mi estis elakvigita, bloko el koto kaj ŝvito meze de la ŝlimo. Miaj savantoj kondukis min en grandegan kuirĉambron bone hejtatan, kie tuj ĉirkaŭis min 10-15 infanoj kaj tiom da plenkreskuloj....Kompreneble ili tuj konstatis, ke mi estas fremdulo, kaj, antaŭ ajna senutila parolo, ili donis al mi akvon por ke mi lavu min, pantalonon kaj sekan ĉemizon. Nur poste okazis la klarigado. Mi tuj diru, ke mi algrundiĝis en kolĥozo, aŭ kolektiva farmbieno. Mi ekparolis en la franca, vane, poste kelkajn germanajn vortojn, ankoraŭ pli vane. Mi ekvidis infanon kun ardezo kaj krajono kaj komencis klarigi per desegnoj, tute nature en esperanto. Tiam, ho miraklo! mirindaĵo de la internacia lingvo, infano alproksimiĝas kaj demandas min per rudimenta sed korekta esperanto. Ekde tiam fariĝis tre facile por komprenigi al tiuj afabluloj la situacion de Paŭlo kaj de niaj bicikloj. (...) Kiel tiuj infanoj lernis esperanton ? Tutsimple en la lernejo, kie propravole instruantoj gvidis kurson kaj disdonis librojn al ili.

Necesis parto de la morgaŭa mateno por purigi niajn biciklojn, niajn pakojn kaj ĉion rekontroli. Antaŭ nia foriro, la plenkreskuloj, ĉefe kelkaj patrinoj, provizis nin per pano, lakto, butero, ktp... por ke ni daŭrigu nian vojaĝon, nun relative mallongan : nur kvardeko da kilometroj.

Feliĉe, la vetero refariĝis ideale bela, ĉar la lasta etapo estis unu el la plej penigaj. Ni devis ja trairi montaron, kie vojo ekzistas nur en la imago. Tamen, meze de la montaro ni trovis terajistojn ĝin konstruantajn. Tuj kiam ni alvenis en NOVOROSSISK leviĝis komplikaj problemoj : unue la pluvalidigo de nia restadpermeso kaj vizo por Kaŭkazio. Efektive, ĉiu Respubliko estas pli-malpli aŭtonoma kaj do libera konsenti aŭ rifuzi la vizojn.

(Sekve de tio, mia kamarado Paŭlo kaj mi devos disiĝi. Paŭlo rajtos daŭrigi ĝis Tiflis kaj Baku, dum mi devos iri al Moskvo por revalidigi mian pasporton, kio trudos al mi neplanitan vojaĝon)

***

La 6an de februaro 1929

Je la 7a kaj duono, mi provas ekiri direkte al Tifliso. La vetero estas relative varmeta kaj malseka. Sed post apenaŭ kelkaj kilometroj mi trovas glaciiĝintan vojon, kiu ofte faligas min. Mi tamen plubiciklas kaj feliĉe atingas sunplenan regionon, kie fandiĝis la glacio. Belega estas la pejzaĝo : maldekstre, la brilegantaj neĝokovritaj montpintoj, dekstre, kvietega bluverda maro surradiata de la leviĝanta suno. Posttagmeze, post la vilaĝo Gelengick, la pejzaĝo subite ŝanĝiĝas. Forlasinte la maron, mi trovas komence pluvglacion, pli fortan malvarmon kaj fine neĝon... Je la 15a la neĝtavolo atingas la nivelon de la radaksoj kaj kovras la glaciiĝintan vojon, kiu pli kaj pli krutiĝas. Mi devas nun piediri. Baldaŭ ĉio malaperas sub la neĝtavolo; malvarmegas, mi ŝvitegas, la nokto alvenas, ankoraŭ pli furiozas la neĝblovado, neniu bruo, neniu ŝirmejo. Mi padelas en la neĝo ĝis la kokso kaj miaj piedoj iĝas malvarmegaj. Mi komprenas, ke mi ne plu povas antaŭeniri kaj ke estas preferinde la restantan forton uzi por retroiri.

Por eliri el tiu neĝo, la vojo estas tiel glitiga, ke eĉ malsuprenirante, mi devas preskaŭ tiel peni, kvazaŭ mi grimpus. Mi eĉ ekpensas forlasi surloke la biciklon por pli facile elsaviĝi. Ankoraŭ kelkajn paŝojn kaj, post vojkurbiĝo, mi ekvidas ĉareton de kamparano kaj tiu ĉi kolektas lignon. Mi retrovas kuraĝon, revenas al la biciklo, kaj fine atingas la ĉaron, kie du aliaj kamparanoj atendas min. Ili ja bone komprenas, ke mi petas ilian helpon. La biciklon kaj min mem ili metas sur la ĉaron kaj ni revenas al Gelengick, kiun ni atingas en plena nokto, dum ĉesis la neĝblovado.

(daŭrigota)

## Iom pri "Laŭte!" :

***************



* La venonta numero aperos fine de oktobro.
Ĝi enhavos i.a. la daŭrigon de la debato pri estonteco de esperanto kaj suplementan liston por la "Adresaro".

* El letero de Ĵansebo : "Koncerne la gazeton mi opinias, ke estas grave, aerumi la artikolojn, eĉ se oni devas mallongigi kelkajn. Ĉar legantoj ne ofte havas sufiĉe da tempo por legi ĉiujn artikolojn, estas agrable, ke ili sciu, ĉu iu koncernas ilin aŭ ne. Kiam eble, estas dezirinde, ke oni prezentu la pli longajn artikolojn per unu frazo, sub la titolo, klariganta kial la artikolo estas interesa."
Respondo de la red. : Mi provas samtempe aerumi, kaj ankaŭ ŝpari lokon por ŝpari... monon. Malfacila afero! Sed mi ne sentas la rajton mallongigi la kontribuojn, nek decidi anstataŭ la legantoj mem, ke io estas interesa aŭ ne. Desegnoj estas ĉiam bonvenaj. La etajn oni povas aperigi stencile, la tutpaĝajn ofsete, sed kliŝo estas pli multekosta!

* Dankon al L. Brunet pro liaj kvin projektoj de fronttitolo por la unua paĝo! Ni sendube uzos almenaŭ unu. Sed ni ne povas tro ofte ŝanĝi la aspekton de nia bulteno...

* Ĵus plialtiĝis la afranko por la ekzempleroj de "Laŭte!" dissendataj en Francio. Iom pli multekostaj estas ankaŭ la papero, la inko kaj la stenciloj. Tial la plialtigo de la abonprezo. Reabonante, atentu la novan "tarifon" : 15FF (12FF por Francio). Dankon.

* Sep personoj partoprenis la unuan debaton per la cirkulanta leteraro de "Laŭte!". Tio estas jam sukceso. La legantaro juĝu mem pri la rezulto en la bulteno. Ni jam petas enkondukon por venonta debato ! Sendi ĝin al "Laŭte!", laŭeble en 3 ekzempleroj.

* Kvankam la red. de "Laŭte!" ankoraŭ ne povis reklami pri la bulteno, la abonantaro iom post iom kreskas. La legantoj mem povas plej efike varbi, komunikante adresojn aŭ montrante la bultenon al sia E-konataro. Dankon.

"K'ANAR" : Regiona ligilo de la liberecanoj en Sud-Okcidenta parto de Francio. En ĝi aperis artikolo pri E en la lasta n° kaj ni esperas aperigi aliajn... Notu la adreson : Collectif Autonome Périgourdin (K'A), 10 bd. Stalingrad, 24000 PERIGUEUX

Directeur:Simonet - Imprimeur:Baudé, 47340 Laroque. CPPAP 58651

## V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J

************************************************

### * RESTADO EN BOVIL' (sekvo al la Ĵakvina teksto)

Ĉu neeltenebla vivsituacio ? Ĉu nekuracebla sintenado?

Mi demandas : Kiuj proponis kaj poste kiuj rifuzis kolektivan organizadon ? Ĉu bezonas organizadon oficialan aro da sep personoj ? ĉu estis iniciativoj pri tio aŭ ĉu la plej-multo pasive atendis, ke la aliaj faru la neeviteblajn taskojn kaj starigu programon ?

Ĉi-jare, mi ne restadis en Bovil', sed dum aliaj restadoj, mi spertis kiom pli facile estas konstrui belajn teoriojn kaj longe diskuti pri ili, ol sin organizi, fari konkretajn proponojn kaj konkretajn agadojn, kiom facile estas paroli pri komunikado, komprenemo, amikeco, inter esperantistoj, ol komunume vivi inter esperantistoj...

Certe, ok tagoj estas tro mallonga periodo por facile sin organizi, ĉefe kiam oni tute ne aŭ malbone konas unu la aliajn, sed ĉu unu (precipe tiu, kiu gastigas) respondecas pri tio ? Kiuj alvenis kun konkretaj proponoj, kiuj vere deziris ion fari ? (Ŝajnas al mi, ke en Bovil' ne mankas klare videblaj taskoj farotaj, ke eblas belaj promenadoj kaj aliaj agrablaj, interesaj aktivecoj!). Sed ĉu la pli-multo ne preferas nenion fari, ripozi kaj rakonti al aliaj siajn tro pezajn problemojn, trovante ĉe aliuloj kompatemajn, atentemajn, amikecplenajn orelojn ? Mi ne tion kritikas, estas nur observoj...

La sukceso de la restado en Bovil' dependas de la partoprenantoj mem, de ilia bonvolemo. Ke ĉiu ĉeestanto estu memstara, respondeca, kaj havu almenaŭ tolereman, solidaran (se ne eblas amikan) sintenon, por la aliaj, kaj ĉio iĝus pli glata ! N. Déjean.

***

Mi demandas min, kial Ĵaklino sentis la bezonon sendi tiun artikolon ; des pli ke la temon oni pridiskutis en Bovil'. Ĝi estas nur sablero en la movado SAT, pri kiu interesiĝas nur la partoprenantoj de tiu restado.

Mi tute ne volas doni pli da graveco ol necese al tiu bedaŭrinda, malgajiga diskuto por tiuj, kiuj amas nian esperantan medion. Por tiuj, kies alligiteco al nia grupo

estas malpli granda (la ĵus varbitaj) la efekto estas bedaŭrinda kaj vundas la koron de la plej sentemaj el ni. Tamen mi opinias, ke oni rebatu ĝin. Kiel partopreninto mi ne povas silenti.

Pri la taskoj necesigataj de la komuna vivo : En kolektivo, neniu estas la servisto de kiu ajn ; do, logike, ĉiuj partoprenu en ĉio. Mi scias, ke tio estas tikla punkto, en iu ajn kolektivo, Bovil' inkluzive. Mi ne estas ofendiĝema homo ; kiam ofendaj paroloj trafas min, mi provas kompreni la kialon (pravanaŭ malpravan) de la ofendinto. Tio memorigas al mi rimarkon de iama gasto, amiko de mia patro, pri malĝentilaĵo de infano : "Se li ne estas ĝentila, des pli malbone por li! la insulto estas por li".

Ĉar sin nutri estas nepra bezono, komprenemaj homoj, kiam proksimiĝas tagmezo, scias, ke oni zorgu pri la manĝaĵoj. Do, tiaj homoj sin direktas al la kuirejo. Se jam kelkaj ekzorgas pri tio, kaj se plia helpanto ne estas necesa, la kromaj personoj tuj sin proponas por la venonta preparado de la manĝo, ktp. Ĉar la partoprenintoj estis malmultaj, tabelo pri tiuj taskoj ne estis necesa. Mi demandas min, ĉu tabelo bremsus la emon de iu, kiu, sisteme, alvenis en la kuirejo, kiam la manĝaĵoj estas tutfaritaj, aŭ la telerlavado komencita.

Nomi la "komprenemajn homojn", kiuj ne atendas, ke la alia komencu, "C..." , kiuj faras la laboron de la mallaborema (Tiu ĉi eĉ konkludis : "Mi ne vidas kial mi malpermesu tion al ili!") tiu rimarkigo ne estas inteligenta, ĝi estas malamikeca... stranga, en nia medio ! Konsideri, ke tiuj, kiuj pleje partoprenis en la komuna vivo estas, nature, laboremaj, do estas logike. Ke ili, en la kolektivo, pli laboru ol la aliaj, estas eraro... stranga koncepto de la kolektiva vivo. Pri mi, kiu ĝuas solecon la tutan jaron, mi ŝatus ĉeesti ĉiujn debatojn pri esperantaj aferoj, kiuj okazis, plej ofte, inter la 10a kaj la 12a, sed, ofte, mi forlasis ilin, ĉar la materia vivo postulis homojn en la kuirejo. Eĉ, pro ĝentileco, mi ne partoprenis la diskuton pri la cirkulanta letero, kiu ĵus komenciĝis, kaj kiun mi ege dezirus partopreni. Iam, junulo rimarkigis : "Pro ĝentileco, oni nenion faru..." Ĝentileco faciligas la kontaktojn inter la homoj, precipe en kolektivo. Ĝi lubrikas la "funkciadon". Mi opinias, ke oni ne forigu ĝin el libereca socio.

Pri la distraĵoj en komuna rondo, celante ĝui la ĉeeston de ĉiuj geamikoj. Giono diris (...) "La estonta generacio ĉiam havas inklinojn, bezonojn, dezirojn, celojn, neantaŭvideblajn de la nuntempa generacio". Tio ĉi supre valoras pri la malsimilaj partoprenantaroj ĉiujare. Fakte, ĉiu partoprenanto proponu siajn dezirojn. Mi ne faris tion, sed estis mia unua restado, mi timis tion fari, ĉar tiuj, kiuj jam partoprenis la bovilan semajnon, nenion proponis. Mi ne bone konis la funkciadon. Mi kunportis kantlibrojn, sed mi ne sciis al kiu tion proponi. Mi opinias, ke komuna kantado en amika rondo donas la impreson de unueco. Ja, ne ĉiuj scipovas aŭ emas kanti, do, eble mia propono ne havus subtenanton... Mi proponis al iu ludi tablotenison. Ŝi respondis: Mi ne scipovas, aŭ mi ne emas, do...ĉar la partoprenantoj estis malmultaj, estis malfacile trovi ŝatanton. Des pli ke la ĵus varbitaj ofte forestis. Tamen, estas multaj distraĵoj, en kiuj ĉiu ajn povas partopreni ; eĉ se oni ne tre emas partopreni, pro ĝentileco oni kuniĝas kun la geamikoj.

Ni, en Bovilo, ne estas turistoj loĝantaj en sama hotelo, sed amikaro, kies ĉeeston oni ŝatus ĝui.

Pri biciklado , laŭ mia scio, almenaŭ unu okazis. Ĉar en Bovilo estis nur porviraj bicikloj, la virinoj ne partoprenis. Ĉiamaniere oni avertis la partoprenontojn kunporti sian biciklon, do...

Suzana.

***

"La intelektulo deziras ĉefe, ke iu diru al li, kion li faru. Li estas ĉiam serĉanta protektadon, kiun li nenie povas trovi. Ĉar kiun li devus akcepti kiel protektanton ? Certe ne iun pli stultan ol li, kaj li ne tuj povos trovi iun pli inteligentan..." (Esther Vilar en "Das Polygame Geschlecht" - en la franca "Le sexe polygame", poŝlibro n°5135)

**********************************************************

* en departemento "LOT" : Informo de kdo SIGNORET

Kiel lastjare ni okazigos propagandan kunvenon en SOUILLAC. Se ĉio glatos, estos la 20a de oktobro. Uzotaj propagandiloj : diapozitivo-serio kun sonbendo de kdo Lentaigne + la SAT-Amikara ekspozicio. Alia, simila, kunveno okazos en SALIGNAC, kie, dum la lasta lernperiodo dekduo da knabinoj sekvis unuagradan kurson.
En SOUILLAC kaj SALIGNAC denove kursoj malfermiĝos fine de Septembro. Ŝajnas, ke ĉiuj ekslernantoj volonte daŭrigos la studadon. Kompreneble ni esperas varbi novajn!

* TULUZA regiono : "Société Toulousaine pour l'Espéranto" komunikis al "Laŭte!" - bedaŭrinde en la franca* - informojn pri ekskursoj, kiujn ĝi projektas por oktobro kaj novembro (En decembro okazos kunveno memore al Zamenhof).

14an de oktobro : vizito al "Villa Romaine de Montmaurin" kaj ĉirkaŭaĵoj. Ekiro de Tuluzo je la 9a. Alveno en Montmaurin je 11.30 antaŭ la muzeo. Kunporti piknikaĵon, bonajn ŝuojn, fotilojn, binoklojn. Ĉiuj, junaj aŭ malpli junaj, e-istoj aŭ simpatiantoj, estas bonvenaj.

Rilati letere kun : Raphaëlle ALBAULT, 14 av.du château d'eau, 31300 TOULOUSE, telefone kun Odette ALBAULT (47-55-49).

La Societo projektas krei kulturan aktivecon en E. (skeĉoj, kantoj, dancoj, ludoj, teatraĵoj). Interesatoj skribu al Société Toulousaine pour L'Espéranto, 3 rue Roquelaine, CRDP, 31 TOULOUSE.

* Ĉar "Laŭte!" celas internacian legantaron, oni bonvolu sendi nur E-tekstojn! Nur esceptokaze ni povas enŝovi specimenon de folio destinita al nacilingva publiko, ekzemple, por Francio, sub la formo "Prière d'insérer". (Red.)

* Ĝ I R O N D I O : Urĝe! urĝe! urĝe! Dimanĉon, la 30an de septembro okazas migrado por protesti kontraŭ la aĉaj elektraj dratoj venontaj de la nuklea centralo de Braud-St-Louis. La ekiro estas en Cambes je la 9a horo kaj la fino en Saint-Sulpice et Cameyrac je la 17a. Ŝajnas, ke la partoprenantoj al tiu migrado konsistigas bonan medion por varbi por E. Do, ni, esperantistoj, partoprenu multnombraj!

Datoj kaj lokoj por la venontaj kunvenoj :

* en oktobro, sabaton la 20an je la 11a horo (kunportu la manĝaĵon) kaj dum la tuta posttagmezo, ĉe ge-Demontoux, en La Burthe - Villandraut.
  Por atingi La Burthe, iri ĝis St Symphorien. Tie, uzi la vojon al Villandraut, trairi St Léger kaj dekstre oni trovas la vojon al La Burthe. Ekde St Léger estos sagetoj.
* en novembro, mardon la 13an je la 19a horo, en Maison pour Tous, CENON.
* en decembro, sabaton la 1an je la 15a horo, en la lernejo de CAVIGNAC. Kantoj kaj dancoj estas jam proponitaj!

La raporto pri la ĝenerala asembleo de la ĝirondia grupo (18.Sept.79 en Cenon) aperos en la venonta numero.